



CONCORDE

Organe culturel
Trimestriel

Direktoro :
Hubert FERÉZ

NICA STELO

Abonprezo : 5 F
Subtenabono : 10 F
Tél. : 84.19.07

Vers une culture, une civilisation supérieures, dans la justice, la paix,
la concorde entre les individus comme entre les peuples.

7, Avenue de Reims
C.C. Postal TOULOUSE 632.15
NICE (Francujo)

N° 43

4ème Trimestre 1974

- NOTRE LIBERTE CULTURELLE -

Nous, espérantistes, travaillons sans relâche pour l'adoption officielle et universelle de la langue mondiale comme seul moyen sérieux de donner aux peuples la possibilité de se comprendre mutuellement sur un pied d'égalité, avec le respect que l'on doit au trésor culturel de chaque peuple. Nous repoussons donc toute hégémonie linguistique, quelle qu'elle soit !

Aussi saluons-nous la campagne faite actuellement par S.A.T. contre l'enseignement et la diffusion par la contrainte, de la langue anglaise.

Trompée sur la véritable nature de l'anglais, la jeunesse accepte cette contrainte.

La progression de l'anglais est favorisée dans un but mercantile, non seulement dans les lycées, les collèges et autres établissements, mais aussi dans la rue, par les moyens audio-visuels et la presse. Une publicité mensongère, digne de la société de consommation s'efforce de créer un état d'esprit imitant les anglais.

Le problème linguistique ne peut pas être résolu par l'étude généralisée de l'anglais. L'absence des normes de prononciation, la nécessité d'apprendre un vocabulaire considérable, l'abondance d'idiotismes et d'homonymes en font un langage instable présentant déjà de nombreuses variantes.

L'anglais ne peut pas devenir la deuxième langue de l'humanité ; il essuie déjà de sérieuses rebuffades dans de nombreux pays d'Asie, d'Afrique et d'Amérique latine où la lutte contre l'impérialisme linguistique ne fait que commencer.

L'intensification de cet enseignement ne peut que défavoriser la jeunesse des pays non anglophones qui, inévitablement, ne peut acquérir une maîtrise de la langue comparable à celle atteinte dans les pays d'expression anglaise. Accepter la contrainte d'apprendre l'anglais, c'est inviter les anglophones à refuser la contrainte d'apprendre d'autres langues que la leur ; c'est leur accorder un privilège incomparable qui ne sera jamais compensé par les quelques avantages immédiats procurés par l'étude de l'anglais.

Des propagandistes anglophones dépensent des sommes considérables afin d'imposer l'anglais sur la scène internationale et de renforcer ainsi leur emprise culturelle, économique et politique sur les autres nations.

(Suite page 2)

Societo, en kiu ne plus ludus la konkurenco, la deziro agi pli utile,
pli bone, pli morale, pli bele, kie regus tuta indiferenco, estus kaduka, perdita
societo. (H.F.)

"NOTRE LIBERTE CULTURELLE" (suite de la page 1)

La généralisation de l'enseignement de l'espéranto comme langue commune à tous les peuples offre des perspectives intéressantes, notamment sur le plan économique. Nécessitant moins de temps et de matériel que l'enseignement des autres langues vivantes, évitant bien des efforts inutiles, il constitue en outre une excellente propédeutique à l'enseignement des langues étrangères pour ceux qui désirent se spécialiser ou pour ceux à qui cela est vraiment nécessaire. Dans l'état actuel des choses, l'enseignement des langues constitue un véritable gaspillage de temps et d'argent sans offrir des avantages pratiques proportionnels à l'effort fourni.

Encourager la progression de l'espéranto, c'est favoriser aussi l'apparition d'un climat d'estime au noyen d'une langue commune mettant tous les interlocuteurs sur un pied d'égalité. Il va de soi qu'il ne s'agit en aucune manière d'éveiller des sentiments d'hostilité à l'égard des anglophones, parmi lesquels beaucoup sont favorables à l'espéranto ou même le parlent. Les manifestations d'hostilité commencent à éclater lorsqu'une langue nationale exerce une trop forte pression sur d'autres langues.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

N O S V O E U X

=====

Chers Amis, qui travaillez, dans l'esprit de "CONCORDE" à préparer le climat d'un monde meilleur, à vous, à vos familles, je souhaite de tout coeur, grâce à l'ardente foi qui nous accorde courage et persévérance, une excellente santé et l'accomplissement des vœux les plus chers pour l'année 1975 !

Hubert FERREZ

ALVOKO de RENE LLECH - WALTER

Vi scias ke mi estas bona amiko de Lapenna ; mi akceptis lin kiam li forlasis Jugoslavion kaj mi proponis lin kiel komitatano de U.E.A.

Sed ni devas memori ke li diris en la festparolado de Hamburgo : "Se la nova gvidantaro de U.E.A.. trovos pli bonajn metodojn, mi estos la plej feliĉa rekoni ke tiuj metodoj montriĝis ĝustaj".

Laŭ mi, ni devas atente observi la agadon de la nova estraro kaj de la nova konsilio.

Dr. Tonkin asertis ke "neŭtraleco estas kaj restos la ĝusta vojo por nia Asocio". Mi estis Prezidanto de U.F.E. dum dek jaroj sed mi forlasis la postenon por pli juna homo. Mi organizis, kun certa sukceso, la Paskan Kulturajn Semajnon de Grésillon dum jaroj. Poste, la junularoj deziris ĝin organizi, mi forlasis la gvidadon.

Ĉefe ni ne devas krei skismon.

La laboro por Esperanto estas trop malfacila precipe nune por dividi la esperantistojn. Ni bezonas ĉiujn fortojn por kune detruji la barojn starigitajn de la kontraŭuloj.

Ni ne faros proceson de intenso.

Lojale, ni observos la konduton de la novaj gvidantoj de U.E.A. kaj se la trajno elreliĝas mi estos la unua forlasi U.E.A.

René LLECH - WALTER

Eks Estrarano de U.E.A. - Eks Komitatano de U.E.A.
Prezidinto de U.F.E. - Federacia Prezidanto - Delegito
de U.E.A. - esperantisto de 1921 - Naskiĝdato : 1906

I N V I T O

-:-

I N V I T A T I O N-:- GROUPE ESPERANTISTE DE NICE -:-

Le 8 DECEMBRE 1974, à N I C E

GENERALA KUNVENO ----- ASSEMBLEE GENERALE

A 10 h. 30 - Generala Asembleo en Restoracio "Les Palmiers", rue Dunan,
(Vallon des Fleurs) - Autobuso N° 2a (Terminus) fronte al
la Restoracio. Jen ties programo :

Enskribo de la novaj membroj.
Raportoj de la Sekretario de la Kasisto.
Elekto de nova komitatano (la postulantoj bonvolu
sendi sian kandidatecon antaŭ la 3a de decembro al la Prezidanto
Hubert FEREZ - 7, Avenue de Reims, 06100 - NICE.

B A N Q U E T (Bankedo)

=====

Auquel sont invités tous les espérantistes de Nice et d'ailleurs, ainsi que
tous les sympathisants !

A 13 h. au même local que pour l'Assemblée du Groupe de Nice :
Restaurant "LES PALMIERS", rue Dunan, Vallon des Fleurs
(Autobus N° 2a - Terminus)

Venez très nombreux à cette manifestation de commune amitié !

Et voici le Menu du Banquet auquel nous nous réjouissons de vous voir participer :

---ooOoo--- M E N U (Menuo) ---ooOoo---

PORKAĴO
NICA SALATO
PASTEĈO je Marfruktoj
KOKIDO laŭ ĉaskudimo
TERPOMOJ
SALATO
FROMAĜOJ
ANANASO kun KREMO CHANTILLY
K A F O

CHARCUTERIE
SALADE NICOISE
CROUSTADE aux Fruits de Mer
POULET Chasseur
POMMES vapeur
SALADE
FROMAGES
ANANAS CREME CHANTILLY
C A F E

VINO : 1 bouteille par personne

PRIX : 30 francs par personne (tout compris)

à verser avant le 5 Décembre (après cette date les inscriptions ne seront plus acceptées)

a) - Mlle M.L. COMINO (Vice-Présidente) 2, rue Pierre Piétri - NICE -

ou b) - ~~Monsieur N. PAZZINI~~ (Trésorier) 126 Bd Gambetta - NICE -
C.C.P. MARSEILLE 1107-93

SUKCESPLENA FESTO EN SOLLIES-PONT

Dimanĉon 29an de Septembro posttagmeze okazis la festo organizita antaŭ la malfermo de niaj kvar kursoj (tri en la klasĉambro, unu hejme).

Jen resumo de tiu manifestado :

(4 ricevis la "atesto"

26 gelernantoj jam aliĝis, 16 novaj, 10 malnovaj. pri lernado)

Nia festo estis anoncita jam de longe. Ĝi komencis je la tria, kaj ĝin prezidis Vicurbestro anstataŭante la urbestron malsana. Post kelkaj minutoj la mezgranda salono kie okazis nia festo estis plenplena. Ĉeestis : krom la vicurbestro, gesinjoroj CAVELAN Prezidanto de la Tulona grupo akompanataj de Sinjoroj AMATO kaj GROS, Sinjorino ROQUES instruistino, la estraranoj de nia "AMICALE", la famkonata folklora grupo "LA SOULETADO" de Solliès-Toucas kaj la gepatroj de niaj gekursanoj kun multaj anikoj de Esperanto. Entute pli ol 80 personoj.

Sur la tabloj "viciĝis" ĉies allogaĵoj : ŝaŭmvino en brilaj boteloj, amaso da kukoj plenigante grandajn pletojn kaj dissemitaj floroj. Gajan etoson magnetofono ludante celtrafajn ariojn. Je la ĝusta horo komencis la festo. La kursgvidanto A. MATHIS je la nomo de la "AMICALE" salutis la ĉeestantaron kaj aludis pri la utileco de la lingvo. Interalie li parolis pri la vivo de Doktoro ZAMENHOF kaj pri liaj klopodoj por disvastigo de Esperanto. Li ankaŭ dankis tutkore la membrojn de la folklora grupo kiuj poste, je nia ĝojo dancadis longe. Post A. MATHIS parolis la Vicurbestro. Li dankis la gvidantojn de nia societo pro iliaj agadoj cele al la disvastigo de nia lingvo kaj bonn de la tuta homaro per kono de komuna lingvo. Li akcentis la fakton ke nia "AMICALE" estas unu el la pli grava asocio de nia kantono dirante : mi esperas ke la "dekok jara kursgvidanto (???) povos ankoraŭ longtempe daŭrigi sian laboron. Li ankaŭ dankis la gepatrojn de niaj gekursanoj.

Tiam ektondris la eksplodantaj gasoj entenataj en la boteloj de ŝaŭmvino korkoj saltis al la plafono. La boteloj da limonado malfermiĝis. La plenkreskuloj kaj la etuloj ekmanĝis kukojn kaj poste trinkis. Fariĝis gajega etoso.

Sed estis tempo de la dancado fare de la "SOULETADO". La dancistoj ĉarmis nin dum pli ol unu horo. La fino de la dancado estis farandolo dancita per preskaŭ la tuta ĉeestantaro. Estis bedaŭrinde la fino kaj ĉiuj devis reiri hejmen.

VE

A. MATHIS

Plibonigo de la Kastelo de Grésillon

Konstrui ĉambregon por la prelegoj kaj kursoj kun la necesa materialo estas eble ambicia/la Kultura Asocio de la Kastelo de Grésillon povis parte helpi.

Sed nun la Asocio dezirus pagi ĉiujn elspezojn por la plibonigo de la Kastelo kaj petas la helpon de la esperantistaro.

Eĉ modesta sumo (minimum 5 fr.) estos bonvena sed kiu povas fari pli, akceligos la laborojn.

Sendu la monon al Sro. Coussé Maurice, 11, Rue Alain de Rougé - 72300 (Sablé-sur-Sarthe) Francujo - aŭ ĝiru al postĉeko 2512-77 - NANTES.

René LLECH-WALTER

LITERATURA ANGULO

MARKIZO DE BEAUFONT (1855 - 1935)

"Unu el la plej unuaj kaj fervoraj adeptoj de Esperanto", citas la biografioj. Sed la reputacio de De Beaufront enhavas ion neeksigeblan en la esperanta literaturo : li estas la homo, tiu _____ honorita de la konfido de Doktoro Zamenhof kaj komisiita de la Majstro por reprezenti lin ĉe la "Delegacio por Alveno de Lingvo Internacia", en Parizo (jaro 1900), _____ instanco, kiu devis reĝustigi kaj prudente selekti utilajn projektojn pri la starigado kaj daurefirmado de Esperanto _____ deklaris sian preferon por nova sistemo de "reformita Esperanto", nomata IDO (esperant..... ido), pri kiu li, De Beaufront, zorge kaŝis, ke li estas la iniciatoro. Tian konduton severe kritikis la aliaj francaj kaj fremdaj disĉiploj de Zamenhof ĉeestantaj. Kompreneble la IDO-skismo fiaskis....

Kaj tamen, oni povas legi en la debofronta libro "COMMENTAIRES SUR LA GRAMMAIRE ESPERANTO" la konkludon : "Nous devons exprimer, en finissant, toute notre gratitude à l'auteur même de l'Esperanto, le Docteur L. ZAMENHOF qui a bien voulu examiner notre travail de la première ligne à la dernière.... Puisse ce petit livre, fruit de beaucoup de travail, coopérer puissamment au succès de notre idée. (Epernay, 1° Edit. Mars 1900). Stranga figuro estas ja De Beaufront....

De Beaufront ankaŭ forĝis al si enviindan kaj pravigitan famecon sur la propaganda tereno, kie li plene agigis nerompeblajn klopodojn kaj sencedan aŭtoritaton. Prezidanto, en 1898, de la Franca Societo por la propagando de la Internacia Lingvo,, li dividis la membrojn en tri klasojn : la "aprobantoj", (simplaj kotizantoj), la "adeptoj" (aktivaj gelernantoj), la "propagandantoj" (titoloj aljuĝitaj al "adeptoj" altirintaj dek aprobantojn aŭ kvin adeptojn).

Li havis apartajn konceptojn koncerne Esperantaĵojn kaj li ne estis laŭdata de ĉiuj pro eble sia intelekta snobismo. Tamen li estas ia originala kaj ne preterlasebla ero de la ĉenego el pioniroj, kiuj estigis Esperanton kaj Esperantujon.....

Robert CERISIER.

Si toute mère se rendait compte des grandes responsabilités qu'elle a envers ses propres enfants au point de vue de l'éducation, elle éviterait de pleurer pour eux dans l'âge mûr, et on aurait ainsi une plus rapide évolution sociales qui conduirait à un résultat bénéfique et harmonieux : La Paix et le Bien-Etre mondial.

Comment il faut apprendre "L'Esperanto"

Par le Marquis de de Beaufront

Si faciles et si simples que puissent être une science et un art quelconque, on ne doit pas moins les étudier avec ordre et méthode. C'est un principe qu'il n'est pas inutile de rappeler à propos de l'Esperanto. En face d'une langue qu'ils comprennent hic et nunc, à l'aide du dictionnaire, certains adeptes oublient que, même en Esperanto, l'art de parler et d'écrire est forcément moins facile que comprendre. Ils le veulent pratiquer trop tôt. A cause de cette précipitation, ils y trouvent une gêne qu'ils éviteraient, s'ils procédaient d'une manière plus logique. Ils n'en iraient pas moins vite et atteindraient le but plus sûrement.

..... Pour bien assimiler et pour bien reproduire les mots, les règles et les expressions d'une langue, quelle qu'elle soit, il faut une observation attentive et un travail d'imitation dont personne au monde ne peut nous dispenser.... Sans eux, impossible de bien parler l'Esperanto, car seuls ils peuvent nous empêcher de transporter inconsciemment dans la langue internationale les bizarreries et les idiotismes des langues nationales. Précisément parce que l'Esperanto est tout entier fondé sur la logique, nous devons nous approprier avec soin les mots justes, les expressions rationnelles qu'il substitue à tant de mots vagues ou faux

..... Fort de l'expérience acquise et des aveux reçus, nous n'hésitons pas à dire : si vous voulez écrire et parler Esperanto avec facilité et correction, ne craignez pas de vous borner à le traduire, jusqu'à ce que vous sentiez que ses formes et ses mots ordinaires vous viennent sans effort à l'esprit. Or, ce fait n'est possible qu'au bout d'un certain temps uniquement consacré à le traduire dans votre langue maternelle. Toute autre voie, vous exposerait à des désillusions.

Communiqué par M. Robert CERISIER.

NOTA - GROUPE ESPERANTISTE DE NICE - Que nos amis de Nice, qui ont omis de payer, au Groupe, leur cotisation (10 f.) pour 1974, veuillent bien s'en acquitter en même temps que de celle pour 1975 (même montant) en les envoyant à notre dévoué Trésorier Norbert PAZZINI, 126 Boul. Gambetta - NICE - C.C.P. MARSEILLE 1107-93 -

Avec ses remerciements : LE COMITE.

oooOooo SONNENBERG oooCooo

Harz- montaron tranĉas la "fera kurteno". La plej alta monto staras en G.D.R., Sonnenberg staras en G.F.R. Sur tiu ĉi monto, meze de vasta arbaro estas konstruita la "Internacia Domo Sonnenberg", kie naskiĝis Internacia Asocio Sonnenberg, kiu grupigas anojn de diversaj nacioj. Tie kunvenas ĉiu- jara personoj, kiuj volas pasigi kelkajn tagojn aŭ senajnojn por "interparoli, venki antaŭ-juĝojn, interkompreniĝi, akcepti respondecojn.

De la 19-a ĝis la 26-a de Julio 1974-a renkontiĝis en Sonnenberg 52 geesperantistoj el 17 nacioj, kiuj parolas 11 diversajn lingvojn : germana, angla, franca, itala, hispana, nederlanda, finnlanda, kungara, bulgara, sveda, dana.

Ciutage okazis prelegoj kaj diskutoj :

Du profesoroj de la universitato de Paderborn klarigis, kial ili interesiĝas pri E-o, kaj kiujn servojn ili atendas de ĝi. La delegitoj de ILEI studis programon por disvastigi la internacian lingvon :

Rilatoj kun UNESKO, informado al sindikataj mondaj organizaĵoj de instruistoj, santempaj esperanto-kursoj en diverslandaj lernejoj kun scienca ekzameno de la rezultatoj post samlonga daŭro de la lernado (ekz. 4 senajnojn, unu jaron, du, tri jarojn), uzado de modernaj pedagogiaj metodoj, instruado al infanoj de fremdaj laboristoj, E-o en unuaj lerno-klasoj, instru-fakoj pri kiuj E-o helpas: literaturo, muziko, sporto (internaciaj renkontoj), geografio (internacia korespondado)....

Nur tri partoprenintoj parolas la francan : Belgino kaj francaj geedzoj. Kuriĝiga fakto estas, ke similaj renkontoj okazas en lokoj pli kaj pli multaj, ke geinstruistoj pli kaj pli volonte partoprenas ilin, eĉ dum sia libertempo.

Gaston TURIN

CARNET DE DEUIL

C'est avec une profonde tristesse que le 8 Octobre dernier, nous accompagnions notre cher Ami, M. FROEHLICH à sa dernière demeure. A la fois éducateur et propagandiste remarquable, il avait le don - fait assez inhabituel de nos jours - de conquérir la sympathie des jeunes et de les intéresser à notre idéal, tout en les aidant bénévolement dans leurs études de mathématiques principalement. Sa disparition laisse un grand vide parmi nous.

A Madame FROEHLICH, à ses enfants, nous présentons nos condoléances émues.

La kvinan de Oktobro, forpasis nia kara Samideano ROFO, kies tuta vivo estis dediĉata al Esperanto, al la pripaca idealo. Malgraŭ sia granda aĝo (89 jara) li partoprenis naciajn kaj internaciajn kongresojn. Dum la lastaj monatoj, kvankam en lito, li fervore ankoraŭ konservis la esperon ĉeesti la lastan Kongreson en Bergamo.

Ni emocioge kondolencas nian samideaninon ROFO.

- LA ITALA KONGRESO DE ESPERANTO EN VERONE -
 -o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

La 45-a nacia itala kongreso de ESPERANTO okazis en VERONO, de la 14-a ĝis la 19-a de Septembro 1974. Kune kun mia edzino kaj gesinjoroj LENOIR, ni havis la plezuron ĉeesti tiun kongreson, kie cetere ni renkontis gesinjorojn MATHIS, el Solliès.

Mi ne intencas prezenti al vi kompletan raporton pri la kongreso : pli detalaj artikoloj aperos en aliaj numeroj de KONKORDO ; hodiaŭ ni simple volas rakonti al vi nian restadon en Italio je tiu okazo kaj prezenti al vi resumon de tiu kongreso.

Ni aliris per aŭto, ĉar estas facile, senpena vojaĝo dank'al la multnombraj kaj bonaj italaj aŭtovojoj. Sufiĉas ĉirkaŭ ses horoj por atingi Verono'n. Kompreneble, ni antaŭe jam estis preparintaj la vojaĝon kaj estis farintaj antaŭmendon pri la hotelo.

Alvenante en Verono, ni havis la surprizon kaj la plezuron vidi plurajn grandajn verdajn flagrubandojn streĉitajn laŭlarĝe de la stratoj, por anonci la kongreson.

Tuj kiam ni estis alvenintaj, ni direkte iris al la kongresejo (en la Universitato), kie oni transdonis al ni ĉiujn dokumentojn pri la kongreso. Poste ni iris al nia hotelo. Tamen, malgraŭ la urboplano kiun mi aĉetis, ni malfacile atingis ĝin, ĉar, kia surprizo ! ĝi staris en kvartalo rezervita por la piedirantoj ! ... Tial ni longe turnis, turnis, turnadis antaŭ ol alveni ! .. Sed, poste, ni multe ŝatis tiun kvartalon, kie la stratoj apartenas al la piedirantoj ; estas tre agrable promeni malrapide tra tiuj stratoj, ne timante la aŭtomobilojn ! Vespere, malfrue vespere, ĝis ĉirkaŭ noktomezo, la tuta kvartalo estas vere tute homplena...

Mi devas diri al vi, ke mia edzino ne estis tute kontenta pri nia hotelo, ĉar ĝi situis vidalvide sonorilturo, kies horloĝo laŭtege sonis la horojn (ne nur sonis sed ankaŭ ripetis ! ... Imagu la dudek kvar batojn, je noktomezo!) Nur poste oni povis ekdormi !

Verono estas vere belega urbo, trairita de la rivero ADIGE, urbo kun riĉa pasinteco, famkonata precipe pro siaj "Arenoj" preskaŭ tiel imponaj kiel la "COLISEE" de Romo, kaj ankaŭ pro siaj monumentoj, konstruaĵoj el diversaj historiaj epokoj, siaj malnovaj preĝejoj rimarkindaj laŭ arkitektura vidpunkto, kun la plej valoraj artotrezoroj... mondfama ankaŭ pro siaj muzeoj entenante pentraĵojn de la plej famaj artistoj el la pasintaj jarcentoj : Titien, Pisanello, Tintoret, Veronese kaj aliaj....

Dimanĉe matene okazis la solena amlfermo de l'kongreso, en la ĉeesto de la tiama laborministro, Sinjoro BERTOLDI kaj de multaj altranguloj, profesoroj

el Italio kaj Hungario. Postagmeze okazis la ĝenerala kunveno de la Itala Esperanta Federacio. En "KONKORDO", pli malfrue, mi donos al vi iom pli da detaloj pri tiuj kunsidoj. Poste okazis multe da fakaj kunvenoj :

- Interregiona Esperanto - Komitato.
- Unuiĝo de Italaj Katolikaj Esperantistoj.
- Itala esperanta Junularo
- Ligo de Muzikistoj Esperantistoj.
- Italaj Fervojistaj asocio.
- Pacistaj Esperantistoj ... kaj aliaj.

Komprenoble ni ĉeestis ne ĉiujn kunvenojn ! Intertempe, ni vizitis tiun belegan urbon ... precipe la belegajn preĝejojn ... la muzeojn... la mondfaman domon de ROMEO kaj JULIA, vizitata de multnombraj amantoj, kaj kie ni trovis kun agrabla surprizo etan libreton pri la historio de ROMEO kaj JULIA, eldonitan en Esperanto !

Ĉirkaŭ la laborkunvenoj estis organizitaj multe da distraĵoj :

- interkona vespero en granda hotelsalono ;
- teatra vespero kun skeĉoj kaj rimarkindaj ĥorkantoj (unu el ili en franca lingvo) ;
- vizito de la urbo kun gvidado de lokaj esperantistoj ;
- dancvespero en la plej granda hotelo de Verono (kun la ĉeesto de la itala kantistino Gigliola Cinquetti) ;
- ekskurso al BOLKA, en regiono famkonata pro siaj fosilioj. Tien ni iris per kvar grandaj aŭtobusoj kaj, post la vizito de la muzeo (komentita en esperanto) oni regalas nin per abunda lunĉo (sanviĉoj, kukoj, lokaj vinoj kaj fruktosukoj) Imagu la etoson ! ...

- fine, tuttaga krozado sur la Garda-Lago, por kiu estis rezervita la plej granda boato de la lago. Ni ŝiphaltis en GARDONE por la tagmanĝo kaj en SIRMIONE por la vizito de tiu pentrinda urbeto ...

Ankaŭ mi diros al vi, ke, mardon posttagmeze okazis Diservo por la esperantistoj mortintaj dum la jaro. Ni ĉeestis tiun Diservon, memore al nia amiko René Froehlich. Tiu Diservo estis celebrita tute en esperanto, fare de kvin esperantistaj pastroj de la kongreso.

Ni bonŝancis, ke dum la tuta kongreso tre bela estis la vetero. Ekpluvis nur la lastan tagon, kiam ni estis revenantaj de la krozado sur la Garda-Lago.

Dum ĉiuj kunvenoj, renkontoj, promenadoj ni ofte havis **ĉkazon** konatiĝi kun simpatiaj italaj esperantistoj (kaj esperantistinoj) ofte paroli kun ili. Mi opinias, ke tiuj okazoj estas tre fruktodonaj por la scio de nia lingvo Esperanto.

Ankaŭ ni konstatis, ke multe da junuloj ĉeestis tiun kongreson. Dum la ekskurso al BCLKA, antaŭmenciita, inter la kvar aŭtobusoj kiuj nin transportis, unu el ili estis tute okupita de junuloj... kun la varma etoso, kiun vi imagas ! Tio estas vere esperdona por la venkateco de l'Esperanto.

ke
Mi aldonas/post la kongreso ni iris ĝis VENEZIO, kie ni restis du tagojn... Malfeliĉe ; sub la pluvo ! Tamen, kia bela, belega urbo ! Kiom da riĉaĵoj ! En VENEZIO ni havis la surprizon renkonti tute hazarde kelkajn esperantistojn venintajn por alia kongreso inter Italio, Jugoslavio kaj Aŭstrio.

Poste ni restadis dum du agrablaj tagoj en PADOVA, sub la reveninta suno, kaj revenis hejmen, ionete lacaj, ionete malvarmunitaj sed feliĉaj pro tiu belega vojaĝo kaj decidintaj denove ĉeesti la proksimanitalan kongreson kiu, eble, okazos en TRIESTE.

----- Georges PARISOT

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

----- B O N T R A V A I L -----

GERMANIO - Milionoj de Germanoj informitaj - La germana gazetaro tre detale raportis pri la Universala Kongreso en Hamburgo : la rikolto estis pli ol 150 artikoloj, aperintaj en ĉiuj ĵurnaloj en la lando. Artikoloj aperis ankaŭ en la kulturpaĝo de kelkaj eldonaĵoj, ekzemple en "Die Welt", mondkonata gazeto.

Al tio aldoniĝas la multaj raporto, eĉ esperanto-kanzonoj, elsenditaj plurfoje de la televido kaj de ĉiuj radio-stacioj. "Deutsche Welle" registris intervjuojn pri Esperanto en 15 naciaj lingvoj per siaj elsendoj por eksterlando. Ankaŭ Prof. Frank, la konata aŭtoro de la tezoj pri germana kaj eŭropa lingvopolitiko, parolis en la radio. Entute pluraj milionoj da germanoj informiĝis pri Esperanto dank' al la Kongreso.

En Francio, "Le Figaro" raportis pri ĝi.
(el Heroldo)

ITALIO - Propagando : La Fermo FIAT eldonis novajn prospektojn kaj, okaze de la Kongreso en Hamburgo, aŭtomobil-vortareton en 5 lingvoj, inter ili Esperanto, kun 400 vortoj aŭ esprinoj. (Se vi deziras ĝin, mendu al ni G.J. 66 de Grasse Village, 78810 - Feucherolles) aŭ rekte al Fiat. Sendokosto: 1,50 F.

Same por eventualaj filmprezentadoj, vi povos ricevi senpage specialajn filmojn. Adreso : Direzione Pubblicità - Corso Marconi - 10-1-10125 - TORINO - Italio.

GUILLAUME J.

-o- FONDS DE SOLIDARITE -o-

Sro Jean BOGO	20,00 F.	Jos DERKS	40,00 F
René CURNELLE	15,00 F	Georges GOUDIN	100,00 F
Raymond FIQUET	50,00 F	Mlle M.L. COMINO	15,00 F

Dankegon pro via amikeca fideleco al nia Kampanjo !

H.F.

--O-- KELKAJ REGIONAJ INFORMOJ --O--

CARPENTRAS (84) - Fine de la libertempaj monatoj, nia Prezidantino, Fino COMITI kunvokis, la 14an de septembro, ĉiuj gesamideanojn el la grupo "Ventua Stelo" por rekoneco de la monataj kunvenoj kaj de la kursoj. En tiu kunveno Fino REYNAUD donis al ni detalajn raportojn pri la internacia Kongreso en Hamburgo, kiun ŝi partoprenis. Poste Fino COMITI, kun plezuro ĝoje transdonis al la laŭreatoj de la ekzameno "Atesto pri lernado" la diplomojn, t.e. al Sro Michel NIKOLAS, Fino Solange NICOLAS, Sro Daniel REYNAUD, Sro Pierre REYNAUD. Ĉiuj ĉeestantoj aplaudis kaj gratulis la laŭreatojn. Ĉeestis ankaŭ la reprezentantoj de la regionaj gazetoj ; ili faris kelkajn fotojn kaj raportis pri nia kunveno.

S. REVEST

N I C E (06) - Niaj kursoj rekomencis en la M.J.C. de NICE-MAGNAN kun komforta ĉeestantaro sub la gvidado de Sro Georges PARIZOT.

La monataj kunvenoj okazas ĉiun unuan merkredon de ĉiu monato, dum kiuj estas prezentataj diversaj prelegoj ; inter tiuj ni jam citu : tre interesaj raportoj de Sino LENOIR pri la Universala Kongreso de Hamburgo, de Sro PAZZINI, pri la Kongreso de BERGAMO en Italio kaj de Sro PARIZOT pri la itala esperantista kongreso de Verone. Tiu kunveno atestas, per la nombro de la ĉeestantoj, pri la vigleco de la Nica Esperantistaro.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

LA SERVANTE - MAITRESSE

Par Marie BONAFOUS
(Poème inédit)

C'est avec grand plaisir que nous présentons ce poème de Marie BONAFOUS, consacré à la libération de la Femme !

Cette poétesse, appréciée par de nombreux écrivains, tels que Paul FORT, Pierre CLARAC, de l'Institut, Jean FREVILLE, a toujours fait preuve, dans son existence de sentiments non conformistes. Le lecteur appréciera, nous en sommes sûrs, l'humour de ce sonnet mis au service d'une position très féministe !

Petite-fille du Doyen de la Faculté d'Aix, polyglotte, éminente Espérantiste, grande voyageuse, essayiste, Marie BONAFOUS est Professeur Honoraire de Lycée (lettres classiques) et s'était, cette année, comme nous l'avons relaté dans "CONCORDE", présentée comme candidate à l'élection Présidentielle....

Voici donc ce sonnet :

L'égalité, Mesdames ? Ah ! nous y sommes bien ...
 Votre condition de servante-maitresse
 Vous agréé fort. Il est mon homme, je le tiens !
 Il vous tient lui aussi : c'est commune détresse.

Mais, songez-y, le dernier mot lui appartient.
 Il est donc détendu, car il connaît l'ivresse
 Du pouvoir, mais pour vous l'effort quotidien
 Souvent exagéré ruine votre jeunesse.

Pour lui plaire, voilà la toilette et l'erreur
 Du fard qui votre peau ride. Pour votre coeur,
 C'est la ruse qui le flétrit et qui le fane.

Allons ! Redressez-vous car il est en vos mains
 Le salut. Initez le courage de Jeanne
 Virile et au coeur chaud. Libérez-vous demain !

Marie BONAFOUS.

FRANDEMULA ANGULO - (Kroniko de Georges PARISOT)

Gulaŝo à Hungara maniero

---oo0oo---oo0oo---

500 g da bova stufaĵo	240 g da cepoj, ronde tranĉitaj
500 g da terponoj	240 g da tomatoj, senŝeligitaj
buljono à akvo	kaj kubigitaj
60 g da butero à margarino	Salo kaj pipro
1 supkulero da papriko	hakita petroselo

Kubigu la viandon. Senŝeligu kaj ronde tranĉu la terpomojn.

En kaserolo fandu la buteron à margarinon kaj fritu la cepojn kaj viandon. Aldonu la paprikon kaj la tomatojn. Kovru per buljono à akvo, salu kaj pipru kaj stufu kaj stufetu dum proksimume 45 minutoj. Aldonu la terpomojn kaj stufetu ankoraŭ 1 horon. Se necesas, aldonu ionete da bolanta akvo. Garnu per petroselo.

V a r i o : Ne uzu terpomojn kaj surtabligu kune kun kuirita rizo.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

IOMETE DA HUMURO

Du infanoj babilas :

- "Kie vi naskiĝis, Petro ?"
- "Mi naskiĝis en kliniko".
- "Cu vere ? Vi estis jam malsana !"

§
§
§
§
§
§

La avino kart-ludas kun sia nepo. Baldaŭ, ŝi rimarkas, ke la juna knabo ludas false, kaj ŝi admonis lin :
- "Cu vi scias, kio okazas al la falsludantoj ?"
- "Certe, avino, ili ĉiam gajnas".

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

H O N O R M A N D I

Ho, cê l'reven de la printempo
Post vintra frost' kaj malvarmec'
En nia bela franca lando
La suno brilas en helec'
Ho kian ĉio reverdiĝas,
La hirundar' al Normandi'
Revenas dum mi sopiriĝas,
Naskiĝolando kara nur pro vi !

Mi konas Svislandeton belan
Kun ĝia neĝomontĉenar'
En Italie' ĉielon bluan
Venizon kun la gondolar'
Sed vidis landon mi nenie
Similan al la Normandi'
Feliĉa mi nur estas tie,
Ĉe vi naskiĝolando, nur ĉe vi !

Tradukita de Raymond HUG.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

NOTO - La grande abondance de matières nous oblige à remettre au prochain Numero de "Concorde" le très interessant article intitulé "MI NE KOMPRENAS VIN" de Georges PARISOT.